


LA JUNA VIVO



MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

JUNULOJ ANTAŬ LA VIVO.

Respondo al Samideano J. Luis Ballesteros. ¹⁾

Kun plezuro mi legis la artikolon „La Junuloj antaŭ la Vivo” en la februara numero de „La Juna Vivo”. Mi ĝojas, ke fine en nia gazeto estis preparolata temo, pri kiu la pli aĝa junularo povas diskuti. Espereble tiaj artikoloj estos pli oftaj.

Vian verkaĵon mi volas dividi en du partojn. En la unua parto vi plendas, ke la penso pri homo, kiu jam antaŭe scias sian tutan vivovoĵon, teruras vin. Vi mem konkludas, ke tio malplaĉas al vi, kaj laŭ via opinio vivi estas ŝanĝi (kaj ŝanĝiĝi). Nu, mi plene konsentas kun vi, ke vivo plena je sensacioj kaj ŝanĝoj estas pli riĉa kaj feliĉa ol nura vegetado. Feliĉe ni povas mem grandparte gvidi

¹⁾ Redakcia noto: Entute venis ses respondoj pri la artikolo de L. B. en la januara n-ro. (El Anglujo (de germanino), Danujo, Francujo, Germanujo, Jugoslavujo kaj Nederlando. Nur unu junulo iom samopinias kun la verkinto. La aliaj havas tute malsaman opinionon, precipe la inoj. Generale la junuloj ne regalias nin per verkaĵoj, do el ĉi tiuj respondoj ni konkludas, ke la temo interesis ilin. Ĉu ne bone havi pli da tiaj „diskutotemoj”? Kiu sendos materialon?

Bedaŭrinde la spaco ne permesas enpresigi ĉiujn respondojn, kvankam ĉiuj estas interesaj. Ni do elektis du, po unu de ambaŭ seksoj.

nian vivon en specialan direkton. (almenaŭ se temas pri ne-materiaj aferoj). Do ni mem faru nian vivon interesa kaj pli riĉa. Kaj tio eblas per mil diversaj metodoj. Ankaŭ vi mem ja elektis unu manieron: vi estas esperantisto. Ĉu tio ne pliriĉigas vian vivon? Mi ne asertas, ke Esperanto estas la sola saltilo el vegetado al vivado, sed ĝi povas grave kontribui al tio. Kaj ne forgesu la ĉiuspecajn flankojn de arto, kiuj povas doni grandajn feliĉon kaj ĝuon. Pensu pri la homaj sentoj, kiaj amikeco kaj amo kaj la respekto por ĉio kreita; ili faras, ke ni vere Vivas. Nia vivo estas tiom varia, kiom ni faras ĝin mem!

Sed nun la dua parto de via verkaĵo. Ĝi ŝajnas vera logilo al ĉiuj junulinoj por ataki vin. Nu, mi ataketos vin. Ni vere ne plu vivas en la tagoj de la (fi-?) fama Miss Pankhurst, feliĉel! (Feliĉe almenaŭ por la inoj). Mi trovas vian koncepton pri junulinoj ridiga. Kvankam eĉ en nia „civilizita“ Eŭropo ekzistas multaj diferencoj inter la vivmanieroj de la popoloj, mi tamen ne povas kredi, ke en Hispanujo la inoj uzas sian inteligentecon nur por kapti viron, por edziniĝi kaj por vegeti plu. Ĉu vi vere pensas, ke ni, junulinoj, ne havas aliajn interesojn? Tiam vi konas nin mirige malbone. Ankaŭ ni havas niajn problemojn, kiuj ofte estas malsamaj ol la viaj, tion mi ne neas, sed ili ankaŭ tre ofte estas similaj al tiuj de la junuloj. Por solvi tiujn problemojn ni uzas nian inteligentecon kaj ne por kapti la virojn. Ni, junulinoj, deziras esti kiom eble plej multe en la vivo kaj ne resti **antaŭ** la vivo. La junuloj akordiĝu al nia tenado: se ili tiam venos al ni, ili aŭdos la jesan vorton eble jam de la tria elektita kaj ili ne bezonos kontentiĝi per la dek-kvina kvalito.

Helmi Veldhuyzen, Nederlando.

Pli da optimismo!

Mi tralegis la interesan artikolon de samideano J. L. B. el Hispanujo kaj mi vere bedaŭras, ke mi ne persone, aŭ almenaŭ perletere, povas diskuti kun li. Do, tamen mi deziras esprimi miajn pensojn, ĉar mi tute ne samopinias kun samideano Luis.

Kiam ni fakte komencas „vivi“? Ni finfine ekstaras antaŭ la vivo. Malfacile estas diri, kiam alvenas tiu momento. Ŝajnas al mi tiam, kiam ni scias, kion ni intencas fari en la estonteco. Ekstari antaŭ la vivo kaj ne scii, kion fari — ĉu tio entute eblas? Ni ne povas permesi, ke nia vivo estu sencela kaj neutila, nek por ni, nek por iu alia. Ni devas esti certaj, ke neniam ni devos koleri

kontraŭ ni mem pro senutile travivitaj jaroj — tio estas la plej granda malfacilaĵo por homo.

En la vivo ni devas ion forte deziri, ni devas scii, ke la tuta homaro postulas de ni almenaŭ malgrandan utilaĵon por la progreso de la komuno.

Estas malsaĝe timi malfacilan vivmanieron — facile vivi ja ne estas interese! Unue ni devas scii kion ni deziras kaj due ni devas havi volon, des pli fortan volon.

Mi ne scias, ĉu mi havas la rajton diri ankaŭ ion rilate inojn, kiuj estis menciataj en la artikolo de nia hispana samideano. Nu, tamen! Mi opinias, ke jam venis la tempo, ke virinoj havu en la publika vivo la samajn rajtojn kiel viroj. Ĉiu ŝtato, kiu ne donas tiujn rajtojn al la virinoj, estas neprogresema. Pri tio oni ja ne povas diskuti.

Samideano Luis skribas: „En la nuna sociordo la virina kariero estas nepre nur edziniĝo”. Bedaŭrinde multaj sociordoj kaj leĝoj estas tiaj kaj ne donas al la pliparto de la virinoj la rajton kunlabori sur ĉiuj kampoj de la publika vivo. Sed — ĉu la sociaj leĝoj estas la plej valoraj kaj eternaj? Estimi homaranismajn leĝojn devas esti la unua tasko de ĉiu homo.

Estus pli bone, se iu ino pli vaste respondus pri tiu temo

La Vivo estas grandampleksa batalludo, pli danĝera ol ŝakludo, ĉar en tiu ludo ne ekzistas „remizo”¹⁾: oni povas nur venki aŭ malvenki.

Vivi estas malfacile, tamen interese. Iu saĝa ĉino diris jam antaŭ mil jaroj: „Neniu printempo revenos!”

-kd-, Jugoslavujo.

TRINKI FIŜON (La ovo de Kolumbo).

Imagu, ke vi en boateto ie ajn flosas sur maro; malproksime de la bordo. Mankas al vi nutraĵo, sed precipe trinkakvo. Kio tiam estus al vi plej utila por (sen helpo) resti vivanta sufiĉe longtempe?

Ĉina hejtisto flosadis 69 tagojn sur malkovrita flosaĵo. Post kvin semajnoj lia akvujo estis tute malplena. La tutan sekvintan monaton ne falis eĉ guto da pluvo. Dum tiom da tempo vi uzas almenaŭ 100 litrojn da teo, kafo aŭ ordinara akvo. Tio estas proksimume la enhavo de tri grandaj laktujoj, kiun vi ricevas, sed ne la ĉino. Brita krozoŝipo trovis lin plenviva.

¹⁾ „remizo” estas nedecidita ŝak-ludo inter du evidente same fortaj ludantoj. Ĉu unu el la gelegantoj scias la ĝustan Esperantan ŝakterminon anstataŭ ĉi tiu neologismo? (Red. L.J.V.).

Kiel li povis vivteni?

La ĉino deklaris: „Fiŝo estas tre sukoriĉa. La oceano estas plena de fiŝoj. Mi kaptis multajn per iom da allogaĵo, hoketo kaj ŝnur-eto”.

Estis tiel. La hejtisto manĝadis kaj trinkadis fiŝojn. Se vi ekzemple tiras moruon tra premilo, vi vidos, ke elfluas certa kvanto da fluidaĵo, kiu estas bone trinkebla kaj havas dolĉan guston. Ĉiu dommastrino fakte scias tion. Kiam ŝi preparas fiŝaĵon, ŝi ĉiam aldonas sufiĉe da salo. Kial? Pro tio, ke alie la fiŝaĵo estas tro dolĉa. Tio, kion la aziano utiligis, estis do tute ne malordinara.

Antaŭe la fiŝkaptilaro neniam aperis sur la oficialaj listoj de ekipaĵoj. Ĝuste la plej simplaj aferoj aŭ objektoj ofte plej efikas. Dum la milito lia ideo rapide aplikigis. Kiam la maristoj devis homekipi la boatojn, tiam ili simple hokfiŝkaptadis siajn mangaĵon kaj trinkaĵon el la maro.

Kruda fiŝo estas bone digestebla kaj la sukaj sensoifigas efike. Centoj da maristoj, kiuj alie estus pereintaj, eltenadis dank' al siaj fiŝhoketoj.

Estas tamen nur malgrandaĵo.

A. F. Bijland Jr en „La Blua Ventorubando”. Tradukis: K. St.

La „regiona” televido ekfunkciis.

La 25-an de aprilo 1950-a naskiĝis en Lille la unua provinca televid-elsendejo de Francujo.

Kial oni elektis la ĉefurbon de Norda Francujo? Pro ĝia geografia situo kaj pro la denseco de la loĝantaro en la regiono de Lille.

Télé-Lille (la baptonomo de la stacio) trovis komfortan „hejmon”: la fieran turon de la malnova urbdomo, kies centmetra alteco tre taŭgas.

La anteno estas orientata al la najbaraj urboj Roubaix kaj Tourcoing kaj samtempe al proksima Belgujo.

La bildoj, ricevitaj sur la ekrano de la televidaj aparatoj estas bonegaj, dank' al la kvalito de la difino: 819 linioj.

La programoj enhavas dokumentajn filmojn kaj originalajn elsendojn. Sed, ĉar la elsenda stacio estas nur 200 vatojn potenca, tiuj „vidaĵoj” estas kapteblaj en malgranda areo.

Tamen, la nuna stacio estos anstataŭigata de multe pli potenca: 3 kilovatoj. Ankaŭ 4 antenoj estos fiksataj. Tiel Télé-Lille estos kaptebla ĝis 70 km malproksime de Lille.


Lasta praktikajo: la ricevaparatoj kun sia speciala anteno kostas proksimume 100.000 francajn frankojn. Feliĉe oni jam en kelkaj publikaj lokoj de Lille povas senpage vidi funkciajn aparatojn.

L. Giloteaux, Francujo.

Propagandu per nia bela, granda, kolora glumarko, farita laŭ la emblemo super la IJK-rubriko. Prezo: 12 ekz. por 20 cendoj, aŭ unu respondkupono. Mendu baldaŭ al la TJO-Libro-ervo, M. Tinxgracht 10, Edam, Nederlando.

Feriu en Francujo, 15-19-j. gejunuloj!

Por vi planiĝis la G.E.E.-aranĝo: 18-taga internacia migranta kolonio, de la 17-a de julio — la 4-a de aŭgusto, ĉe la okcidenta marbordo kaj kvar insuloj: Yen kaj Noirmoutier k.t.p., inter Nantas kaj Bordeaux. Loko por 20 Esperanto-parolantoj. Kostoj: 8000 fr.fr. (inkluzive de gastigado kaj ekskursoj). Urĝas aliĝi. Vizito al Parizo: de la 5-a ĝis la 7-a de aŭg. Geinteresatoj petu detalan cirkuleron de f-ino Jeanne Dedieu, 3 rue Arzac, Toulouse, Francujo.



ILEI-RUBRIKO.

(Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Ned. Centra Informejo: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo).

Tri elstaraj eventoj okazas en la instruista mondo dum ĉi tiu jaro.

La 1-a estas la enketo pri Esperanto en la Lernejoj, nun farata de ILEI kaj UEA-kunlabore. Jam venis respondoj el multaj landoj, sed multaj geinstruistoj ŝajne prokrastas. La praktikaj rezultoj de tia enketo povas esti tre gravaj por la movado, ĉar ni ĉiuj deziras interkoniĝi kaj ankaŭ interkonigi niajn gelernantojn je la ĝusta nivelo. Do, se vi ĝis nun ne sendis la respondaron, aŭ eĉ ne ricevis formulon, agu tuj!

La 2-a afero estas la Internacia Instruista Seminario, kiun okazigas la Germana Sekcio de ILEI ĉe Kochel ĉe Lago (26/7-4/8). Mi opinias, ke ĝi estas la unua tia seminario. Jen bonega okazo por diskuti, proponi, ĝui belegan ĉirkaŭaĵon kaj entute helpi nian laboron.

Mi mem intencas partopreni kaj esperas renkonti multajn kolegojn. Kvankam la vojaĝkostoj nuntempe estas tre altaj, la restadkostoj en Kastelo Aspenstein estas nur 6 G.M. tage. Enskribigu vin NUN ĉe s-ro Kröber, Esp. Vereinigung Deutscher Lehrer, 13-a Kitzingen I, Germanujo. (Kaj ne forgesu int. respondokuponon, kiam vi bezonas respondon.)

Ni montru, ke ni esperantistaj geinstruistoj povas pli facile ol aliaj kunigi kaj antaŭenigi niajn celojn. La sukceso de tiu ĉi seminario montru la vojon al pli intima kaj vasta kunlaborado inter lernejoj.

La 3-a evento estas la ILEI-kunvenoj en München, en la kadro de la 36-a UEA-kongreso. Tiam la dua jaro de nia funkciado finiĝas.

Ni ankoraŭ estas en nia infanaĝo. La kreskigo de internacia societo nuntempe estas treege malfacila kaj dependas de la fideleco kaj la fido!

Jen nia programo:

- I. Dimanĉon, la 5-an de aŭgusto, je la 17-a h: **ESTRARA KUNVENO** de ILEI (reprezentantoj oficialaj estas invitataj).
- II. Lundon, la 6-an de aŭgusto, je la 17-a h: **PUBLIKA AFERKUNVENO** de ILEI.
 - a. Bonvenigo.
 - b. Paroladeto de la Prezidantino, F-ino V. C. Nixon, B.A.

c. Raporto de la Sekretario, s-ro Einar Dahl, pri la jaro 1950-1951.

d. Diskutado.

e. Prezento de diversaj novaĵoj de individuoj. (Bonvolu informi min, se vi volas prezenti ian indaĵon).

III. Merkredon, la 8-an, je la 17-a h.: **PUBLIKA KUNVENO DE IELI.** Prelego kaj diskutado pri la temo: „Instruado pere de Aktiveco“. Ĉefparolanto: s-ro Einar Dahl, Svedujo.

N.B. Ĉiuj, kun praktika lerneja sperto estas invitataj kontribui al la diskutado. Bonvolu anonci vin antaŭe al mi, kun precizaj detaloj.


Kaj nun mi sendas al vi bondezirojn kaj espereble bonan vojaĝon.

Via samideano, Violet C. Nixon,

183 Woodlands Park Rd., Bourneville, Birmingham 30, Anglujo.

Striks, la Flameo (daŭrigo).

„Sufiĉe, sufiĉe, kara strigo. Vi jam plendis tro multe. Ankaŭ ni volas rakonti ion.



Hodiaŭ estis familiano via en nia lernejo. Bedaŭrinde morta, sed tamen belega birdo.

Ni nomas ĝin ŝtonstrigo. La latina nomo estas *Carine noctua*.”

„Kompatinda onklo mia. La homoj mortigis ĝin.”

„Tion ni ne scias, Striks. Kiom malgranda ĝi estis.”

„Jes, edamaj infanoj, ĝi estas la plej malgranda strigo, kiun mi konas. Ĝi faras sian neston ĉie: en malplenaj arboj, en garbejoj, eĉ en kuniklejoj. Ĝi estas tre agrabla besto.

El la lerneja gazeto de Edam, Nederlando.

Ruzaj enigmoj.

1. Al kiu demando oni povas respondi nur per „ne“?
2. Anjo estas en la ĉambro, sed ŝia kapo ne estas en la ĉambro. Kiel tio eblas?

La Fajrbrigadejo.

Antaŭ nia domo, trans la strato, staras la fajrbrigadejo.

Antaŭ la fajrbrigadejo estas la pordo, malantaŭ kiu estas la fajrestingiloj.

Malantaŭ la fajrbrigadejo estas la ripozoĉambro, en kiu la fajrbrigadistoj ludas kaj atendas, kiam ili ne estingas fajron.

Kiam la sonoriloj sonas, la fajrbrigadistoj kuras al la fajrestingilo kaj saltas sur ĝin. La direktilisto ekfunkciigas la motoron kaj la fajrestingilo veturas rapide sur la vojo al la fajro. Kiam ĝi forlasas la fajrbrigadejon, la fajrosireno komencas kaj ankaŭ la fajrestingilsonorilo sonas. La sireno ofte vekas nin dum la nokto.

Peter Whalley, Elliston Sec. Mod. School, Cleethorpes, Anglujo.

Kio ĝi estas?

(Unu el la provoj de la konkurso en la januara n-ro).

Ĝi estas besto.

Ĝi estas nigra kaj blanka.

Ĝia nomo estas Petro.

Ĝi havas kvar krurojn.

Ĝi havas du okulojn kaj voston.

Ĝi loĝas en tre malgranda domo el ligno.

La domo ne havas fenestrojn. Ĝi ne havas pordon, sed ĝi havas truon, tra kiu la besto povas eniri kaj eliri.

La besto dormas en la domo kaj ofte sidas ekster ĝi.

Oni ligas la beston al la domo per ĉeno.

Ĝi estas mia amiko kaj ludas kaj promenas kun mi.

Ĝi amas min kaj mi amas ĝin.

David Chiswell (10-jara), Bodmin, Cornwall, Anglujo.

Vizito de Sveda Esperantisto.

Nin vizitis sveda esperantisto. Kvankam la vetero estis malbona, ĉiuj miaj kamaradoj, kiuj lernas esperanton, venis por renkonti lin.

Tuj post kiam mi eniris la lernoĉambron, mi vidis sveltan viron. Li venas al mi kaj diras: „Bonan tagon!” kaj li tute amike premas mian manon.

Iom time mi respondas: „Bonan tagon”, ĉar estas la unua fojo, kiam mi parolas Esperanton kun eksterlandano.

Li tute ne aspektas, kia mi imagis lin. Antaŭe mi pensis, ke li estos bruna, serioza homo. Kaj ŝajnis al mi, ke li havos akcenton kiu tute malsimilas al nia. Sed male. Li estas tre granda. Li ridas kaj ŝercas kun ni. Li estas — laŭ la diroj de nia instruisto — tipe sveda.

Li rakontas iom pri sia lando. En Esperanto, kompreneble. Mi komprenas lin sufiĉe bone. La pli malfacilajn frazojn nia instruisto tradukas. Por bone klarigi li uzas geografian karton.

Li diras: „La Nordo de Svedujo, Laplando, havas malmultajn loĝantojn.” Kaj li parolas pri la moroj kaj kutimoj de la Laplandanoj.

Por danki lin ni kantas kelkajn esperantajn kantojn kaj ludas kelkajn ariojn per niaj flutetoj.

Ni tutkore manpremas kaj adiaŭas lin.

Verkita laŭ la Freinetmetodo de Huguette Laigre, Francujo.

La lavangaj katastrofoj en Aŭstrujo.

Kiel vi eble aŭdis, okazis en Aŭstrujo grandaj katastrofoj pro lavangoj. La „Flachgau”, kie ni loĝas, indulgiĝis, sed la loĝantoj de la „Pongau” kaj „Pinzgau” en Salzburg kaj de Tirol kaj Kärnten multe konfuziĝis.

Tio venis tiel: Antaŭ kelka tempo, sabate venis subite stranga neĝfalo. Neĝis la tutan posttagmezon senĉese. Neĝis ankaŭ la tutan nokton, ĉar matene, kiam mi eliris, la neĝo kuŝis tre alta. Neĝtavolo, pli alta ol unu metron, kovris stratojn kaj placojn kaj malebligis la trafikon.

Se estis tiom da neĝo en la urbo, kiom da neĝo do estis en la montaro?

Jes, en la montaro estis terure. Kelkaj vilaĝoj estis tute sub la neĝo, pro kio la kamparanoj devis elfosi siajn domojn el la neĝo. Kelkaj vilaĝoj ne havis elektran kurenton, nek telefonon, nek telegrafon.

Dum la sekvintaj tagoj estis stranga degela vetero. Estis tre varme kaj senfinaj neĝaj amasoj movis sin. Ili venis de la montoj al la valoj kaj ili kunŝiris ĉion, kio staris sur ilia vojo.

Multaj kamparanoj perdis en la neĝo la havaĵojn, la brutaro pereis kaj la domoj ruiniĝis.

En la Kötschachtal en Gastein lavango kovris la domon de du familioj. Ĉe tio mortis 14 personoj. Malĝojiga estas ĉi tiu fakto, kiam oni pripensas, ke inter la mortintoj estas tri infanoj malpli ol dek jaraj. Nur unu virino ne mortis.

Ankaŭ en Tirolo lavango multe difektis. En bestejo mortis 20 gebovoj. Ankaŭ la vilaĝeto Heiligenblut ĉe la Grossglockner (la plej alta monto de Aŭstrujo) gravege suferis. Ĉi tiu vilaĝo estis dum longa tempo sen kontakto kun la ekstera mondo, ĉar telefono kaj telegrafo estis detruitaj kaj ili ne havis manĝaĵojn. En Alpoj

mortis proksimume 50-70 homoj, sed ĉiutage estas nun novaj lavangaj katastrofoj. Ĉar la malfeliĉuloj, kiuj restis, nun estas tute malriĉaj kaj senhejmaj, la registaro organizis kolektadon. Ĉiu donacis laŭpove por mildigi la mizeron. Tiel oni kolektis pli ol 1½ milionojn da ŝilingoj, krome kvar vagonojn da donacoj (manĝaĵoj kaj vestoj).

Sed kiu povas sekigi la larmojn de la gevidvoj kaj georfoj, kiuj perdis la parencojn?

Ĉu ne estas ĉagrene?

Ida Hager, Salzburg, Gaswerksgasse 22, Aŭstrujo.

Mi estas 12½-jara lernantino de la ĉeflernejo en Salzburg kaj mi faris la verkajon sola. — (Ida faris la verkajon eĉ tiom bone, ke ni devis pli simpligi ĝin por „La Juna Vivo”. — Red.).

Li mem vidis ĝin!

Vilĉjo fiere rakontas al sia patrino: „Mi vidis viron, kiu faris ĉevalon!”

Kiam la patrino mire diras, ke tio ne eblas, Vilĉjo diras:

„Tamen! Kiam mi pasis, li estis preskaŭ preta. Li ĵus metis la hufoferojn sub la piedojn!”

Brazila legendo.

(Klarigo: En la brazilaj arbaroj loĝas stranga birdo, la Araponga-o (*Chasmorhynchus nudicollis*). Ĝi estas granda 25 cm kaj tutblanka kun verda gorĝo. Plej interesa estas ĝia voĉo. La krio komencas per preskaŭ dolĉa: „rejn-rejn-rejn”. Oni povas kompari ĝin kun la sono de funkcia fajlilo. Sed subite venas „pejn!”, vere kvazaŭ batus granda martelo sur amboson aŭ grandan kaldronon. Tial ĝi nomiĝas ankaŭ „Ferreiro” = forĝisto).

Foje, la onca'o (felis pintada) proponis al la araponga-o, ke ili konkuru, kiu el ili povos teruri la alian.

La araponga-o akceptis la proponon. Nun la onca-o grumblis tiom terure, ke ĉiuj malgrandaj bestoj en la arbaro ekstremis, sed la araponga-o (kiu vivas sur altaj arboj!) tute ne teruriĝis.

Tiam venis la araponga-o. Ĝi komencis: „rejn-rejn-rejn!”

La onca-o mokridis: „Ĉu tio estas via tuta arto?”

„Ne juĝu tiom rapide!” respondis la araponga-o kaj rekomencis preskaŭ dolĉe: „rejn-rejn-rejn”, ĝis la onca-o ekdormetis.

„Pejn!” falis la martelo sur la kaldronon kaj — la onca-o ek saltis pro teruro.

Rerakontita de Erika Linz, Praarbaro, Caraguatatuba, Brazilo.

Kial la leporoj havas fendlipon.

Karaj amikoj, nun mi rakontos al vi estonan popolfabeleton.

Foje kunvenis la leporoj por interkonsiliĝi sub granda pirarbo. Ĉiuj plendis. La plej maljuna leporo estis la prezidanto. Li parolis jene:

„Karaj amikoj. La leporo estas la plej mizera estaĵo de la mondo. Se la arbustoj eksusuras, la leporo jam timas sovaĝan beston. Se eta arbofolio falas teren, la leporo jam perdas sian kuraĝon. Ni timas ĉion kaj nin timas eĉ ne kulo. Ĉu ne estas pli bone, ke ni mortigu nin en la maro por fini tiun teruran sorton? Ĉu ne estas egale pli frue aŭ pli malfrue?”

La leporoj kapjesis, balancis siajn orelojn kaj ekkuris al la maro por fini siajn suferojn.

Sur la marborda herbejo paŝtis granda ŝafaro. Unu el la ŝafoj subite rimarkis la alkurantajn leporojn. Ĝi komencis time blekadi kaj forkuris. La tuta ŝafaro kuris post ĝi. La ŝafoj kuris, sed ili mem ne sciis kien kaj pro kio! Post la ŝafoj kuregis la hundoj. La paŝtistoj kriegis kaj gestis per siaj bastonoj. Do estis plena haoso kaj bruoj.

Kiam la leporoj atingis la supron de la monteto antaŭ la maro, ili vidis tion kaj fariĝis ridemaj. Ili eksidis sur siajn malantaŭajn piedojn kaj tiel ridegadis, ke iliaj lipoj fendiĝis pro la ega ridado.

La plej aĝa leporo nun diris al siaj kamaradoj: „Rigardu, nia situacio ne estas tiom malbona. Ankaŭ ni estas fortaj, se ni kunigas kaj agas kune. Tiam oni timas ankaŭ nin!”

Kaj ili forlasis la ideon mortigi sin en la maro. Sed — de tiu tempo ĉiuj leporoj havas fenditajn lipojn.

Skribu, kio estas la instruo de tiu ĉi fabeleto? La vortoj de la maljuna leporo estas kuraĝigaj por ĉiuj junaj laborantaj esperantistoj, kiuj celas realigi la uzon de Esperanto kaj la konstruon de demokrata, socia, ideala vivo sur la tero.

El hungara gazeto tradukis Paŭlo Balkányi, Budapeŝto.

ENIGMO-RUBRIKO.

Mi ricevis dek kvar (14) provojn. La plej multaj estis ĝustaj; du venis el Nederlando.

Nova enigmo:

Ŝanĝante ĉiam unu literon oni povas fari unu vorton el alia. Ek-

zemple: Hundo — fundo — fendo — tendo — tento. Por fari el „hundo” „tento”, mi do uzis 3 aliajn vortojn.

Inter	KAPO	kaj	PATO	necesas	nur	unu	vorto
„	RANDO	„	BIRDO	„	„	du	vortoj
„	DRAKO	„	FLOTO	„	„	tri	„
„	KESTO	„	PORKO	„	„	kvar	„

Faru ankaŭ por vi mem tian ĉenon, kiom eble plej longa.

Serĉante ligontajn vortojn en via vortaro vi eble trovos utilajn vortojn, kiujn vi antaŭe ne konis.

Sendu vian provon antaŭ la 10-a de junio al s-ro T. K. Slade, 7, Southview Road, Southampton, Anglujo.

Solvoj de la ruzaj enigmoj: 1. „Ĉu vi dormas?” 2. Ŝi klinas la kapon tra la fenestro.



**7-a Internacia
Junular-Kunveno
en Haarlem, Nederlando
(26/7—2/8 1951)**

Adr. Organiza Komitato:
M. Tinxgracht 10, Edam,
Nederlando.

Jam estas majoj! Post iom pli ol du monatoj nia 7-a I.J.K. realiĝos. Kiu ne jam anoncis sin, do rapidu! Ni decidis prokrasti la daton por la plialtigo de la kostoj ĝis la 15-a de junio, ĉar multaj ĝis nun ne povis decidi pri vizo- kaj aliaj malfacilaĵoj. Sed post tiu dato la kostoj nepre estos pli altaj!

La organiza komitato laboras. Ĉu ankaŭ vi? Ĉu vi jam pristudas iun eron por kontribui en la vesperaj programoj? Kaj — jam bone studu la kantojn en „La Juna Vivo”-kantaro! Kiu ne posedas ĝin, povas mendi ĝin ĉe nia libro-servo, M. Tinxgracht 10, Edam, Nederlando. Ĉiu ja posedu ĝin, ĉar ĝi estos nia oficiala kantaro! Studu ankaŭ la „Himno de la Eŭropa Junularo”, kiu staras en la februara n-ro!

Komprenoble ĉiu partoprenonto deziros propagandi nian IJKn. Tiucele ni farigis tre belan, koloran glumarkon, laŭ la bildeto super ĉi tiu rubriko. Vi povas mendi kvanton da ili ĉe la TJO-libro-servo. Vidu la koncernan anoncon.

Dua listo de partoprenontoj: **El Britujo:** 62. Eileen Bates (Birmingham), 63. Marg. Evetls (Birmingham), 64. Patricia Watson (London), 72. Anne Ardern, 73. Beryl Barker, 74. Sybill A. Bates, 75. Marg. Briddon, 76. Barbara Joan Broadbent, 77. Winifred Bury, 78. Betty Clayton, 79. Ralf J. Corbett, 80. Rita M. Corbett, 81. Patricia B. Eades, 82. Jean Harrison, 83. Patricia A. Harrop, 84. Marg. R. M. Heaton, 85. Pat Hurst, 86. Janice Hyde, 87. Evelyn Ingham, 88. Edith Johnson, 89. Prultne G. Jones, 90. Elisabeth Lees (ĉiuj el Denton Nr. Manchester), 91. Donald Richard Lyons, Halewood, 92. Brenda McAllister, 93. Janet Mallor, 94. John Napton, 95. Glenise Parkin, 96. Pamela M. Spittle, 97. May A. Stephen, 98. Dorothy Swindells, 99. Elir Cl. Eades, 100. Vera Hartley, 101. Norman Williams (ĉiuj el Denton/Manchester). **El Germanujo:** 53. Alfred Engroff (Darmstadt), 65. Kurt W. Ringbeck (Köln-Sülz), 66. Friedel Petermann (Dortmund-Aplerbeck), 67. Kurt Meyer (Bremen), 68. Rudolf Koch (Mülheim b. Koblenz), 69. Udo Schmidt (Königstein), 70. Rolf Brune (Dortmund). **El Francujo:** 54. Jacques Warenbourg (Paris). **El Nederlando:** 51. Arjo Geurts, 52. Robby Kaagman (ambaŭ el Edam), 55. Betsie Schouwink, 57. Adrie Teunissen, 58. Alie Teunissen, 59. Elly E. Avères, 60. Johannes Bokhove (ĉiuj el Hengelo), 56. Harnie Bergsma (Enschede), 61. Liesbeth Ligtermoet (Bilt-hoven), 71. D. v. Dijk (Amsterdam).

SKOLTA RUBRIKO.

Paco kaj ĝojo Tamen!



Jen la temo de grava skolta festo, kiu okazis en la franca ĉefurbo la 4-an de marto. Per tiuj vortoj la tuta skolta asocio, en kiu regule kreskas la aro de esperantistoj, intencis montri, ke nuntempe ĉiuj devas neŭtrale labori por la Paco.

Por ni tute ne montriĝas necese, ke ni interkonsentu kun alilandaj diplomatoj aŭ politikistoj. Nia celo estas starigi kaj kreskigi spiriton pacaman en ĉiuj terenoj de la Vivo, precipe inter la junuloj, kiuj trapasis dolorplenajn militajn jarojn.

Tiel oni komprenas la veran sencon de Esperanto, kiu ne celas rilati kun la riĉaj diplomatoj, kiuj povas elspezi multe por havi interpretistojn, sed kiu volas helpi la malriĉulojn kaj junulojn de ĉiuj landoj, ke ili interrenkontiĝu por diskuti inter si la estontecon, frate kaj „samideane“.

Tion ĉiuj Esperantistoj, kaj unue la junaj, kiuj estas la „Espero de Esperanto“ nepre devas kompreni.

Ja Paco kaj Ĝojo povas esti la devizo de la tuta junularo.

Lamo Diplomata.



T.J.O.-RUBRIKO.

(Sekretariino: *Helmi Veldhuyzen, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Nederlando*).

Nova ĉefperantino en Ĉeĥoslovakujo: f-ino Kamilla Lampirova, Okryski 94, Morava, ek de nun reprezentos T. J. O. en sia lando. Ni deziras al ŝi multan sukceson.

Samtempe ni multe dankas la eksĉefperanton, s-ron Mašek, kiu en la malfacilaj cirkonstancoj tiom laboris por nia movado! Ni deziras al li bonfarton!

Ni tre dankas s-ron W. G. Atkinson, sekretarion de la L.K.K., pro la invito ĉeesti la BEA-kongreson dum Pentekosto.

S-ron Michel Schmidt estos la TJO-delegito en la kunveno de propagandistoj, kiu okazos dum la Universala Kongreso de Esperanto en München.

La 3-an — 4-an de marto fondiĝis dum la Svisa Esperantista Jarkunveno Junularsekcion.

Ni deziras al la nova organizo sukcesplenan laboron!

Raportoj, proponoj kaj diskutotemoj por la TJO-jarkunveno en Haarlem, atingu la sekretariojn antaŭ la 1-a de julio.

Ĉiu estas petata aperigi informojn pri nia 7-a IJK en la gazetaraj naciligva kaj esperantlingva. Oni bonvolu sendi tiuspecajn artikolojn al la sekretarioj.

H. V.

Fondiĝis Regiona Ligo Baden de la germana sekcio de TJO.

Imitinda ekzemplo. — La 10-an de decembro 1950-a kunvenis en Donauschingen deko da delegitoj de la Badenaj Esperanto-junulargrupoj por fondi la Regionan Ligon (Landesverband) Baden.

Tiu regiona ligo, bazanta sin sur la diversaj Esperanto-junulargrupoj, nuntempe klopodas esti akceptata en la badena junularparlamento (Landesjugendring), kie estas reprezentataj ĉiuj pli gravaj junular-organizoj.

Krom la financaj subtenoj, kiujn ricevas ties membroj, malfermiĝas tute novaj perspektivoj kaj eblecoj por propagandi Esperanton inter la junularo, nome rekte per la diversaj junular-organizoj (katolika, protestanta, sindikata, socialista, naturamika junularoj k.t.p.), kiuj en siaj konferencoj kaj gazetoj tuŝu, de ni instigataj, pli ofte ol ĝis nun la helplingvan problemon kaj diskutu pri ĝi. Tiel ni vekos la intereson de la organizita junularo.

Cetere, tiu penso devenas de nia dana ĉefperanto, Kaj Pedersen, kiu en sia parolado „Kiel interesigi la junularon pri Esperanto“ dum nia 6-a IJK en Konstanz eldiris, ke unu vojo estas la esperantigo de la ekzistantaj junular-organizoj.

La granda nombro da partoprenontoj kaj la internacieco de la pasintjara TJO-kunveno estas tiurilate bona argumento por nia forteco. La plej fortaj Esperanto-junulargrupoj en Baden estas Freiburg kaj Konstanz.

Kvankam niaj klopodoj ofte troviĝas antaŭ preskaŭ neforigeblaj baroj, ni daŭrigas kaj esperas, ke ni baldaŭ povos raportiri pri efektivaj sukcesoj de nia aktiveco.

Michel Schmidt, 1-a prezidanto.

POŝTMARKRUBRIKO.

El Ĉeĥoslovakujo, de amiko Vaĉlav Levora, ni ricevis belajn poŝtmarkojn. Li petis svisajn, hispanajn aŭ aliajn. Ni kolektis jam kelkajn, sed ne sufiĉe. Kiu helpos nin?

Ankaŭ amiko Jaroslav Bily en Praha petis p.m. Ĉu vi jam ricevis nian sendaĵon?

El Francujo p.m. de s-ino Thebaud kaj de s-ro Chasseriaud. La sendaĵojn al vi ni esperas baldaŭ forsendi.

Jonathan Hicks (Anglujo), nia komencanto en la poŝtmarko-mondo, estas kontenta, ĉu ne?

Libro-Servo, Edamo.

RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

Kredu min, sinjorino, originale verkita de Cezaro Rossetti; eldonita de Heroldo de Esperanto (Scheveningen, Nederlando) okaze de ties 30-jara jubileo. Belaspekta, bindita libro; prezo 5,40 guld. (1,65 dol.) — Streĉa aŭtobiografio, en kiu oni plezure legas pri la aventuroj (kaj artifikajoj) de la aŭtoro, kiu komence estas kuiristo, poste fariĝas vaganta vendisto, Prave Raymond Schwartz diras en la antaŭparolo: „La verko, same kiel bona vino, ne bezonas reklamon. Sufiĉas ĝin gustumi.”

Miru, pensu, ridu, de Paul Benneman, eldonita de Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando. Belaspekta, bindita libro, 240-p.; prezo 5,40 guld. (1,65 dol.). — Ni citas el la antaŭparolo: „La libro enhavas multkoloran mozaikon el ĉiuj materioj: el la historio de la plej antaŭa pasinta tempo ĝis la plej aktuala nuno; ĝi gvidas tra la tuta mondo kaj ĝis la steloj, en la regnojn de la naturo kaj de la tekniko, en la sciencoj kaj al la mirakloj de la lingvo. Ĝi prezentas ludojn kaj kaprompilojn, enigmojn, problemojn de multaj specoj” Mallonge: libro kun riĉvaria enhavo, tre taŭga por konversaciaj kunvenoj.

1, 2, 3, Peĉjo kaj Anjo kalkulas, komponita de Vilho Setälä, desegnaĵoj de Elsi Borg, eldonita de Eld. Vilho Setälä, Helsinki, Finnlando. Belaspekta bildolibro (kun koloraj bildoj) por infanoj. Prezo 0,51 dol. (afrankita) — La bildoj celas doni „vivon” al la ciferoj en la imago de la infanoj. La unua paĝo donas instrukciojn al gepatroj kaj geinstruistoj. La bildpaĝoj ne havas tekston. Utila libro por ĉiu infano.

Ariel, de José Enrique Rodó, el la hispana lingvo tradukita de Manuel Fernandez Menendez. 157-p. libro, prezo 1 dol. Eldonita de Urugvaja Esperanto-Societo, Yaguarón 1397, Montevideo. Jen la unua esperantlingva verko el Urugvajo. Nefacila, tamen altvalora libro, fakte prelego al grupo da junaj homoj, por vekti la plej noblajn sentojn kaj idealismon kontraŭ la troa materialismo, admiro kaj imiteco al Usono (la libro estas verkita antaŭ 50 jaroj).

Marista Terminaro, kolektita de komandanto Peter Clissold, 62-p. libreto, eldonita de UEA, Rickmansworth, Herts, Anglujo. Prezo s. 1/6 plus 1 p. por afranko (5 resp. kup.) — La 10-a fakterminaro, eldonita de UEA.

Jarlibro de UEA, unua parto 1951. Neaĉetebla, liverebla nur al individuaj membroj.

Sveda Novelaro, 235-p., belaspekta libro, eldonita de Sveda Laborista Esperanto-Asocio, Barnhusgatan 8 n.b.ö.g., Stockholm, Svedujo. Prezo 6 sv.kr. La libro enhavas 20 novelojn de nuntempaj laboristaj verkistoj kaj biografiojn pri ĉiu verkisto. La noveloj estas tradukitaj de F. Szilagyi.

GENERALAJ INFORMOJ.

Labortendaro en Jugoslavujo. Junularaj sekcioj en Jugoslavujo sciigas ĉiujn junajn geesperantistojn, ke oni organizos ĉijare esperantistan laborgrupon, okaze de la konstruado de la tria junulara fervojo en Bosnio. Oni laboros en julio kaj aŭgusto. Ĉiu devos pagi nur la vojaĝkostojn ekster la limoj de Jugoslavujo. Programo ne jam estas preparita, sed konsistos el laboro kaj vojaĝado tra nia lando. Oni ne ricevos monon por la laboro, sed ankaŭ nenion pagos. Geinteresatoj skribu al Kralj Drago, Rozna dolina 6-22, Ljubljana, aŭ al: Takac zeljko, Boškoviĉeva 24, Zagreb, Jugoslavujo.

La Kolonja Esp.-Unuiĝo intencas aranĝi la 2 tagojn antaŭ la UEA-kongreso (2-3/8) esperantistan renkontiĝon en sia urbo. Skribu por informoj al s-ro J. F. Berger, Ehrenbergstr. 1, (22c) Köln-Riehl, Germanujo.

Arkeologia tendaro. La Dana Internacia Studentkomitato en kunlaboro kun la Studenta Esperanto-klubo en Kopenhago ĉijare denove aranĝos internacian arkeologian tendaron por esperantistaj studentoj kun tre alloga programo. La tendaro okazos de la 3-a ĝis la 17-a de julio en la insulo Bornholm, apud la vilaĝo Dalshøj. Sub la gvidado de arkeologoj de la Nacia Muzeo en Kopenhago la partoprenantoj partoprenos la elfosadon de domoj el la frua ferepoko. Post la restado en Bornholm okazos interesa restado en Kopenhago. Pro grava ŝtata subvencio la restado en Bornholm kostos nur 8 d.kr. Oni petu pli detalajn informojn al Dana Internacia Studentkomitato. La Universitato, Sct. Pederstraede 19, Kopenhago K., Danujo.

Internacian Somerrestadejon aranĝos la Slovena Esperanto-Ligo dum la XV-a Jugoslava Esperanto-Kongreso en Ljubljana (7-10/7) kaj dum la postkongresaj tagoj en la plej belaj lokoj de Slovenujo.

Esperantistoj invitas vin partopreni la kongreson kaj ekkoni la landon. La kondiĉoj estas jenaj: La S.E.L. prizorgos kaj pagos la vivtenadon ĉe ni, kontraŭ la garantio de egaltempa gastigado de unu el niaj esperantistoj en via lando. Vi povos pagi ankaŭ per libroj. La vojaĝkostojn oni mem pagu. Faru detalan interkonsenton kun Slovena Esperanto-Ligo, Ljubljana, Cankarjevo nabrezje 7/1.

Akordiĝo inter la pariza sekcio de TJO kaj la Junulargastejo en Maisons-Alfort kreis la eblecon al malmultekosta restado en antaŭurbo de Parizo! La TJO-anoj havos la samajn rajtojn kaj devojn kiel la junulargastejanoj. La gastejo estas tre simpla, sed bona hejmo, kie oni povas dormi, manĝi (aŭ mem pretigi sian manĝaĵon), lavi k.t.p. La kostoj estas 50 fr.fr. tage. Por ĉiuj informoj oni skribu al s-ro J. Bertin, 96, rue Jean Jaurès, Maisons-Alfort (Seine), Francujo.

Esperanto estas parolata ankaŭ en la bela junulargastejo de Sophie Zuber, en Mollans (Drome). Ĉiujn informojn oni petu de: Sofio Zuber, Mollans-Drome, Francujo.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Bulgarujo: 17-j. knabo dez.kor.k.l.t.m., interŝ.poŝtm., poŝtk., gazetojn, fotojn, ktp. Janĉo Petrov Janev, Str. „Kliment Oridski 26, Burgas.

Ĉeĥoslovakujo: Kvetoslava Kourková, 17-j., studentino, Jihlava Havlickova 40, kaj Marie Koláčková, oficistino, Jihlava, Malinovského 7, dez.kor. k.gesamideanoj en la tuta mondo. Respondo certa.

Vera Grušová dez.interŝ. modajn revuojn precipe kun Francujo. Adr.: Děčín-I, str. de 7 Cistopadu 523/12.

Francujo: 21 lernantinoj, 14-16-j. dez.kor.k.ĉ.l. Respondo certa. Adr.: S-ino Thébaud, 174 Av.Dampierre, Valenciennes (Nord).

Germanujo: La Esp. junulargrupo en Freiburg organizos letervesperon komence de junio. Oni petas korespondaĵojn, ktp. Konradin-Kreutzestr. 20.

Hispanujo: Korekto: Pedro Mates Gil (22-j.) Juegos Flora lcs., 141-1°, Barcelona, dez.kor. pri atletismo (ne ateismo) k.mehanismo.

Lernantoj de la Esperanto-grupo de la Kooperativo „Nueva Actividad Obrera”, str.Juegos Florales 118, Barcelona, dez.kor. k.l.t.m.

K-do R. Sorolla, str.Torrente de Vidalet, 13,1° = la, Barcelona-G., interŝ. pm.k.ĉ.l. Resp. certa, se estas per rekomendita letero, zorge fermita.

Japanujo: 17-j. lernanto dez.kor. kun gesamideanoj en Nederlando. Keiji Isonaga, Kitateramaci Tano-cho, Miyazaki-Ken.

S-ro Jasuo Okada, 38 Joŝimaĉi, Fuse-ŝi, Osaka-fu, serĉas korespondantojn.

S-ro Shojiro Kawaguchi, 23-j. instruisto, dez.kor., interŝ.desegnaĵojn, gazetojn, ktp. Adr.: 15,3cho, Asakayamacho, Sakai-City, Osaka.

5 studentoj dez.kor.k.gejunuloj en ĉ.l. pri div.temoj. Skribu al s-ro Kazuaki Kobayashi, 6 chome-1, Honchodoni, Nakano-ku.

S-ro Tetuhiko Huzikawa, Hasimoto-kara 646, Nagasone-cho, Sakaisi, Osaka, 23-j. instruisto dez.kor. kaj interŝ. pk. Resp. certa.

Nederlando: Kiu familio en Danujo, Svedujo, Norvegujo aŭ Francujo dez. interŝ. loĝejon kun familio en Nederlando, de 25/7-10/8, aŭ: vi akceptos nin, kaj ni vin en alia tempo. Leteroj al: C. W. Schraa, Lernejestro, Oudleusen (Dalŝen).

B. Brachetti, IJselstr. 16, Amsterdam-Z., dez.kor.k.interŝ.pm.k.l.t.m. escepte de Ĉeĥoslovakujo.

Juna sportjurnalisto ŝatus ricevi il.sportajn poŝtkartojn el ĉiuj landoj. W. Prinŝen, Ericastr. 24, Assen.

Ni gratulas: Maarten Stolp kaj Bertha Wit (el West-Graftdijk) kiuj geedziĝis la 21-an de marto. Ilia nuna adreso estas Noordervaart D 31, Stompeteren, Nederlando.